Ni Ĉiuj

Duonjara Revuo de Meksika Esperanto Federacio.

Numero 1/2009

LA GRAVECO DE LA RENKONTIĜOJ KAJ LA PAROLA PRAKTIKADO DE LA LINGVO



La 10a Meksika Esperanto Kongreso: Lingvistika diverseco en Meksiko: fundamenta parto de ĝia kulturo

Meksika Esperanto Federacio

Ni havas la plezuron prezenti al vi la unuan numeron de la jaro "NI ĈIUJ", kies ĉefa temo estas *"LA GRAVECO DE LA RENKONTIĜOJ KAJ LA PAROLA PRAKTIKADO DE LA LINGVO"*, tial vi trovos artikolojn pri tiaj personaj spertoj de meksikaj esperantistoj.

La Nacia Kongreso alproksimiĝas kaj precize ĝi estas la plej granda kaj bona eblo por pluraj samideanoj renkonti sin kaj praktiki la lingvon, la evento pligraviĝas kiam la kongresejo estas en rekona kaj grava universitato, kies estroj apogas al Esperantaj aktivuloj instrui tie la verdan lingvon senpaŭze ekde 2003.

La Jura Fakultato de la Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko (UNAM) akceptis okazigi la 10an Meksikan Esperanton Kongreson danke al la inda interveno de Luis Córdova Arellano, aktiva esperantisto en la lando, kies laboro kaj apogo gravas por la plibonigo de nia movado.

Tiel oni faras historion kaj ĝi restas kiel atesto por la venontaj generacioj, kiuj certe lernos de niaj agadoj, tiel kiel ni lernis kaj lernas konstante pri antaŭaj kaj nunaj esperantaj aktivuloj. Pro tio ni decidis publiki en tiu ĉi numero, kaj en la sekvontaj, iom da historio de la movado en la lando. Ni speciale dankas al Fidel Figeroa Martínez, kiu sciigas nin per lia artikolo historieron de Esperanto en Meksiko.

En la enhavo ne mankas la informo de esperantaj aktivecoj de MEF-estraranoj, meksikaj kaj eksterlandaj esperantistoj; gravuloj, kiuj helpas plifortigi la movadon nacie kaj monde.

La kunlaboro kaj unuiĝo de konoj kaj fortoj havas bonajn rezultojn, tial la estraro dankegas al ĉiu kontribuanto por sendi artikolojn, informojn, bildojn, ktp., kiuj ebligis fari la nunan numeron de la revuo. Indas mencii ke la bela kovrilo estas dezajno de Salvador Chacón Ramírez, kiu afable akceptis fari ĝin kaj bone la taskon faris. Nun mi invitas al vi ĉiuj ĝui la legadon!

Mallely Martínez Mateos

Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

ENHAVO

LA GRAVECO DE LA RENKONTIĜOJ KAJ LA PAROLA PRAKTIKADO DE LA LINGVO 4

Esperanto kaj la magio de Uxmal - Salvador Chacón Ramírez 4

Mia unua esperanta babilado - David López Rueda 6

Miaj esperantaĵoj - Luis G. del Valle 8

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO 11

Pri la nova monero de kvin pesoj – Fidel Figueroa Martínez 11

KUNVOKO AL LA ĜENERALA ASEMBLEO DE MEF 2009 13

CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL FME, 2009 14

LA 10A. MEKSIKA ESPERANTO KONGRESO OKAZOS EN UNAM 15

Aliĝilo por la 10ª Meksika Esperanto-Kongreso 16

PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEKSIKO 17

Esperanto estas por ĉiuj – Mallely Martínez Mateos 17

Komencis la instruado de Esperanto en Tijuana, Baja California – Mallely Martínez Mateos 18

ALIAJ ESPERANTAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO EKDE NOVEMBRO 2008 19

PRI AGADO DE EKSTERLANDAJ MEFANOJ 23

La Ateliero Verda: Artgalerio kaj informejo pri Esperanto – Milan Sveda 23

LA GRAVECO DE LA RENKONTIĜOJ KAJ LA PAROLA PRAKTIKADO DE LA LINGVO

ESPERANTO KAJ LA MAGIO DE UXMAL...

Salvador Chacón Ramírez

Mi naskiĝis en Guadalajara, sed ekde kelkaj jaroj mi loĝas en Mérida, Yucatán, kiu troviĝas en la sudorienta parto de la lando. Tie mi studis kirurgion. Antaŭ du jaroj mi malsaniĝis kaj devis ripozi hejme. Tiun tempon mi interrete trovis Esperanton, post du aŭ tri monatoj mi legis kaj skribis bone en la internacia lingvo sed mi havis problemon: kiel praktiki ĝin se mi konis neniun, kiu parolas Esperanton. Do, mi provis varbi novajn esperantistojn.

En hospitalo, kie mi studis, mi prelegis dum kultura sesio pri artefaritaj internaciaj lingvoj. Mi parolis pri volapük, solresol, interlingua, ktp, fine la prezentado temis pri Zamenhof kaj liaj ideoj; la ĉeestantoj faris kelkajn ekzercojn por kompreni la facilecon de la esperanta gramatiko. Ili tre interesiĝis pri “Pasporta Servo” kaj ŝajnis ke la plej multo el ili restis kontentaj pro la ricevitaj informoj.

Sed tiu eksperimento estis fiasko. Post tiu sesio, neniu demandis min pri Esperanto, kaj multaj el miaj kunlaborantoj ekis rigardi min kiel se mi estus frenezulo; miaj proksimaj amikoj nomis min "Esperantonto" (esperantstultulo).

Dum la sekvaj ferioj, kiel ĉiujare, mi veturis al la ĉefurbo de Meksiko kaj loĝis ĉe geamikoj. Ni kutimas manĝi kune kaj paroli pri diversaj aferoj, tio estas la plej interesa parto de miaj ĉiujaraj vojaĝoj. Do, dum manĝado, mi parolis pri Esperanto kaj ili ekmokis, mi ĉagreniĝis kaj daŭris parolanta plej fervore ĝis mi vidis denove

strangan rigardon de miaj amikoj. Kiel miaj kunlaborantoj el Mérida, ili rigardis min kiel frenezulo; pro tio ekde tiam, mi ĉesis paroli pri la internacia lingvo.

Sed tiel subite io okazis, kiel la grandaj hazardoj je la vivo... Mi ŝategas viziti Uxmal, kiu estas arkeologia loko proksime de Mérida, ĝia etoso estas tiel magia ke mi iras tien monate por rigardi spurojn de tiu ĉi alloga ruinurbo.

Piramido de la divenulo en Uxmal, Yucatán.

Antaŭ duonjaro mi atendis miajn amikojn ĉe la enirejo de la arkeologiejo kiam subite eksterlandano demandis al mi: "Ĉu vi parolas Esperanton...?" Certe mi ŝokis tiam kaj nur respondis hispane "¿quéeeee?!!!" (kioooon?!!!). La junulo denove demandis min: "ĉu vi parolas Esperanton?", sed tiam lia demando estis malpli entuziasma ĉar li povis vidi la dubon en miaj okuloj.

Post momento kaj nervoze, mi respondis al li: "JES, mi parolas Esperanton..." Li ridetis kaj alvokis siajn amikojn; subite mi estis ĉirkaŭita de aliaj eksterlandanoj. Tiam mia esperanta nivelo ne estis tre bona ĉar mi neniam antaŭe parolis ĝin kaj dum monatoj mi ne legis aŭ skribis ion ajn pri Esperanto, tamen ni povis plene interkomunikiĝi.

Kiam miaj amikoj alvenis, ili ne kredis kion ili vidis: mi estis parolanta en Esperanto. Ankaŭ ili ŝokis kiam mi prezentis miajn novajn amikojn el Germanio, Francio kaj Italio. Ambaŭ grupoj kune trairis en la ruinojn kaj por la eksterlandanoj ne estis neceso dungi gvidiston ĉar mi konas parkere la lokon kaj parton de ĝia historio. Dum nia trairo, miaj meksikaj amikoj provis paroli kun la aliaj en la angla, hispana kaj

franca lingvoj. Fakte ili interkomunikiĝis, sed ne plene ĉar ne ĉiuj el eksterlandanoj konis la tri lingvojn kaj miaj amikoj ne bone regas la anglan nek la francan. Post la promenado ni manĝis en la loka restoracio kaj fine ni adiaŭis ĉar la esperantvizitantoj veturis al Cancún.

Ili supozis ke mi estas esperantisto ĉar tiam mi survestis verdan ĉemizon kaj ĉapelon kun blanka stelo. Verdire mi ne intencis aspekti kiel samideano, tiun tagon mi ne havis alian puran ĉemizon kaj la suno estis tre forta, kiel kutime en Yucatán, tiel ke oni devas protekti sian vizaĵon per ĉapelo.

Nun miaj amikoj aktive lernas Esperanton, ili esperas vivi denove tiun magian sperton, kiun ni havis iam en la ruinoj de Uxmal. Finfine mi atingis mian celon: varbi novajn esperantistojn. Per mia fervora parolado nure mi atingis mokojn kaj tian kompateman rigardon sed per la reala praktiko miaj amikoj povis senti persone la potencon de la ideo de Zamenhof.

Kvarangulo de la Monaĥinoj en Uxmal, Yucatán.

Jen mia sperto kaj mia fina konsilo: ne varbu nur per parolado sed ankaŭ per praktiko...!

MIA UNUA ESPERANTA BABILADO

David López Rueda

La unuan fojon kiam mi parolis Esperanton estis antaŭ du jaroj. Aŭtune 2007 mi estis invitita partopreni la 2an kunvenon en Querétaro kaj mi povis ĉeesti ĝin. Mi estis kontenta kiam mi sciis ke mi iros al tiu urbo kaj renkontos aliajn Esperantistojn.

Kvankam mi antaŭe neniam parolis kun samideanoj, mi ja korespondis kun knabo el León, Guanajuato kaj havis la okazon babili perrete kun aliaj du aŭ tri geesperantistoj. Sed mi volis scii kiel bone mi povas komunikiĝi buŝe antaŭ aliaj buŝo kaj oreloj.

Kiam mi alvenis al la placeto kie mi renkontiĝis kun Francisko – la organizinto de la kunveno –, mi rimarkis ke virino afabla portis ĉemizon blankan kun verda stelo sur ĝi. Ankaŭ ŝi tuj vidis min kaj, eble kredante ke mi estis vojaĝanto, demandis: ‘ Ĉu vi parolas Esperanton?’ Min surprizis tio ke mi unuafoje aŭdis alian homon eldirantan tiun frazon en tiu lingvo al mi! Kontente mi respondis al ŝi “jes” kaj alproksimiĝante salutis ŝin kaj komencis havi mian unuan vivantan babiladon kun alia Esperantisto. Tiu Esperantistino estas sinjorino Guadalupe Vega, kiun mi multe estimas kaj dankas por esti tiu persono.

2ª.Semajnfina renkontiĝo en Querétaro, kie López havis sian unuan esperantan babiladon.

La ĝojo kaj la surprizo ne lasis min poste, ĉar ankaŭ mi baldaŭ ricevis telefonvokon al mia poŝtelefono de Francisko por demandi ke mi kaj mia nova amikino atendu lin por iri gvidata de li mem al la renkontiĝejo. Tie mi renkontis aliajn Esperantistojn tre agrablajn kaj kun kiuj mi provis nervoze kaj hezitante babili kaj konatiĝi.

Estis la unua fojo ke mi parolis vizaĝalvizaĝe kun Gustavo Luna, el León, Sara González, el Guadalajara, la fratinoj Mallely, Morayma kaj Nelly Martínez, el Tecámac, Martin Schaeffer, el Germanio, Luis Raudón el Acapulco, Martha Cárdenas el Tijuana, Gloria kaj Frank Helmuth el Kalifornio kaj Atilio Orellana, el

Argentino. Ekde tiam mi sekvas la kontakton kun pluraj esperantistoj, ne nur de mia lando sed de aliaj nacioj, la surprizo de reala komuniko per Esperanto ne finas, eĉ pli kiam mi troviĝas antaŭ homoj, kun kiuj mi me povus paroli se ne estus en la Internacia Lingvo Esperanto.

MIAJ ESPERANTAĴOJ[1]

Luis G. del Valle

Kvarfoje mi havis kontakton kun Esperanto dum la preskaŭ sepdek-ses jaroj de mia vivo. La tria baldaŭ estis sekvata de elreviĝo kaj la kvara estas la estanta. Do, tiuj du fojoj estis la plej gravaj, la du unuaj taŭgis malpli ĉar mi kontaktis kun la lingvo, sed ne kun la esperanta movado kaj ĝiaj idealoj.

1. Kiam mi estis skolta knabo, proksimume dek-tri-jara, mi aĉetis kaj legis libron de Sir Robert Baden Powell, fama inspiranto kaj, mi pensas, fondinto de la skolta movado. La libro, tradukita el la angla, titoliĝis hispane “El Escultismo”. El ĝi mi memoras nur malligitajn aĵojn, inter tiuj, la konsilon, ke oni uzu la liberan tempon por lerni Esperanton. Mi ne scias plu la kialojn de tio, mi memoras nur du rimarkojn: ĝi estas facila lingvo kaj la lernolibro ne multe kostas. Tamen mi ne sciis kie akiri la libron kaj kiel kontakti iun esperantiston en Meksikurbo. Mi parolas pri la jaro 1939, tiam mi eksciis pri la lingvo kaj nenio plu, eble la deziro scii pli restis en subkonscio.

2. Multaj jaroj pasis dum kiuj mi ne pensis pri Esperanto sed iam mi babilis pri memoraĵo de mia skolta knabeco kun iu kiu posedis kurson por komencantoj, verkita en la itala: “Corso di Esperanto per l’allievo e per l’autodidatta” de Corrado Grazzini presita je 1954. Mi ricevis ĝin kiel donaco en 1964, dudek kvin jaroj post mia ekscio pri Esperanto kiel kreita lingvo.

[1] Tiu ĉi informo estis prezentita de la aŭtoro dum la 5ª TAKE, okazinta en majo 2003 en la ĉefurbo de Meksiko.

Iomete mi lernis la lingvon, tamen mi ne interesiĝis pri la lernado sed pri Esperanto kiel kuriozaĵo kun mirego pro la genio de Zamenhof, kiu kapablis munti lingvon gramatike tutregula kaj flekseblega pro la kunmetado de radikoj kun afiksoj. Scienca kuriozaĵo, ĉar mi tiam bone konis hispanan, latinan kaj germanan gramatikon kaj mezbone francan kaj anglan. Tiu kunmetado havas gravan rolon en ĉiu lingvo, estis tamen genie, simple genie ke tio estas la kutima maniero por krei la vortaron. Do, mi ne lernis Esperanton per la itala libro, mi volis nur scii kiel estas Esperanto kaj miregi pri ĝi kiel lingvo artefarita.

3. En iu metrostacio, je 1987, mi vidis inviton por festi la centjaran revenon de la naskiĝo de Esperanto. Mi iris en universitatan domon por aŭdi prelegojn kaj vizitis ekspozicion pri esperantaj leteroj, poŝtkartoj, libroj, bultenoj, revuoj, ktp. Mi iris ankaŭ al la kulturdomo de Coyoacán por aŭdi laŭtlegojn, parolita de junulo, kaj muzikon en kunveno organizata de la pola ambasado. Tiam mi rilatis kun esperantistoj, akiris librojn kaj materialojn. La Inĝ. Fidel Figueroa kaj la s-rino Gudalupe Vega vendis tion tre afable.

Ĉifoje interesiĝis mi pri Esperanto kiel serĉo de unuiĝo de popoloj laŭ la koroj sen la trudo de unu lingvo sur la aliaj. La lingvo estas finfine gardisto kaj esprimilo de la kulturo, defendo kontraŭ la kultura imperiismo: kontraŭ la angla kiel absoluta reĝo de la lingvoj.

Aliafoje mi komencis la lingvolernadon, tiam per libretoj de Ergoto sed baldaŭ mi senkuraĝiĝis. Mi opiniis ke la potenco de la angla super la aliaj estas nevenkebla; ĉar oni nenion povas fari kontraŭ la komerca, diplomata militema usona potenco. Mi diris al mi, kiel multaj diras al si, ke peni por Esperanto estas senutila, ni devus uzi tempon kaj strebi al lernado de la angla. Do, mi Esperanton forlasis sed ne entute ĉar mi kelkfoje revenis al ĝi, legis ion aŭ alvenis la interreto en kiu mi trovis la flavajn paĝojn de Esperanto. Mi ĉiam estis konvinkita ke la Esperantaj idealoj kaj movado

multe valoras, sed la problemo estis la praktiko. Do restis nur mia intereso pri la komprenado de la lingvo sed ne pri la parolado.

4. Mia fako estas teologio. Je la sepdekoj kaj okdekoj la episkopoj kaj teologoj proklamis sin kiel la voĉo de la senvoĉuloj. Malantaŭe oni rimarkis ke ĉiuj voĉon havas, ke ĉiuj povas teologie paroli ĉar ĉiuj, kiuj spertas pri Dio kaj ĝin esprimas, laŭ ilia maniero, faras teologion. Tiel ili igas alternativan teologion, t.e. teologio kiu ne forigas tion kutiman de fakuloj faritan, sed ĝin kompletigas kaj kritikas.

Kiel en aliaj fakoj, oni diras ke estas nur unu maniero produkti bonaĵojn kaj komerci: tiu de la fakuloj. Tamen estas aliaj manieroj flanke de la reguloj de la liberala sistemo. Aliaj komercas alternative kaj tiu ĉi komerco ne forigas la kutiman sed ĝin kompletigas kaj kritikas. Estas la tiel nomita: “Komerco justa”

Kiam mi observis teologion kaj komercon, kaj aliajn alternativaĵojn kiel medicinon, nutradon, rimarkis ankaŭ ke samas rilate al la lingvoj. Do, Esperanto estas lingvo alternativa, kiu ne forigas aliajn sed ilin kompletigas kaj kritikas precipe kiam iu provas la aliajn forigi.

Alternativaj teologoj, komercistoj, kuracistoj sin okupas pri siaj aktivecoj, kvankam bone scias ke ili estas kontraŭ la pli multo da fakuloj kaj oficialuloj de teologio, de la “libera” komerco, de la vendebla medicino. Tiuj ecoj vekas esperon por pli bona estonteco; signas la alireblajn vojojn kiam la nuna sistemo malaperos kiel ne homeca.

Esperanto same kun ili donas la esperon ke ni ne nepre perdos nian kulturon, kiam ni interkomunikos kun pli potencaj popoloj. La justa komunikado estas ebla nur per lingvo ĉies kaj nenies. Post kiam mi tiun vojon trakuris novfoje, antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, interesiĝis pri esperanto. Eble mi ne lernos ĝin bone pro mia aĝo, mi tamen klopodas. Krom la lingvo mem, mia ĉefa intereso estas la Esperantaj idealoj kaj movado.

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO

PRI LA NOVA MONERO DE KVIN PESOJ

Fidel Figueroa Martínez

Omaĝe al la Centjariĝo de la Meksika Revolucio oni eldonis novan moneron kun valoro de kvin pesoj; ĝi surdorse havas stampitan portreton de Heriberto Jara.

Jen kiamaniere tiu elstara homo rilatas kun "Ni Ĉiuj":

La esperantisto Ernesto Guerra estis desegnisto krom gravuristo laboranta ĉe la fabriko de teksaĵoj de Santa Rosa Necoxtla, Veracruz, - lulilo de nia kara lingvo-. Kelkajn tagojn de kiam li eklaboris tie, por sin distri kutimiĝis vizitadi la najbaran urbeton Río Blanco. Tie, li baldaŭ faris du bonajn amikojn precipe kaŭze de iliaj komunaj idealoj.

La unua el tiuj karaj amikoj de Guerra estis la tiama komercisto Camerino Z. Mendoza; tiu kiu poste fariĝis elstara revoluciulo. Dank' al kiu la Vilaĝo Santa Rosa nuntempe havas lian nomon; tio estas: Ciudad Mendoza.

La alia amiko de S-ro. Guerra estis Heribeto Jara, tiama librotenisto de la Fabriko de Teksaĵoj de Río Blanco, li kiu poste ankaŭ fariĝis elstara revoluciulo. Pri tiu ĉi homo oni povas legi ĉe la elektronika reto: ke Heriberto Jara naskiĝis meze de la jaro 1879 en Nogales, Veracruz, kaj mortis en la Ĉefurbo Meksiko en aprilo de 1968.

Kiam komencis la Meksika Revolucio li aliĝis al la ribeluloj kaj fariĝis Generalo. Post la venko de Francisco Madero, Jara estis Konstitucia Deputito de

1917, poste Gubernatoro de Veracruz. Lázaro Cárdenas nomis lin Prezidanto de la Partio de la Meksika Revolucio. De la Cenato, li ricevis la Medalon Belisario Domínguez; kaj de Sovetunio la Lenin-Premion de la Paco, tiam ekvivalento al Nobel-Premio.

Nu, en tiuj antaŭ-revoluciaj jaroj S-ro. Guerra, en la Ĉefurboj Meksiko kaj Puebla, krom desegnisto laboris kiel ĵurnalisto; kaj kaŭze de la artikoloj kiujn ofte li skribis kontraŭ la diktatoreca reĝimo de la Prezidento Porfirio Díaz, estis feroce percekutata kaj fine enkarcerigita. Li rakontas ke dum sia enkarceriĝo fetiĉe disponis da sufiĉa tempo por sin dediĉi al poŝta korespondado kun bonaj esperantistoj.

Heriberto Jara skribis pri tiu elstara esperantisto:

¨Ernesto Guerra estis unu el tiuj revoluciuloj apartenantaj al la Malnova Gvardio, bedaŭrinde ne bone konata ĉar li estis tre modesta homo, li neniam paradis nek pavumis por vidigi sian personon, li posedis grandan kulturon sed pli granda estis lia modesteco, pluraj el liaj artikoloj indas esti relegataj, tamen ili estas je forgeso ĉar tiuj kiuj legis ilin neniam trovis la aŭtoron por honori lin; aparte, ĉar preskaŭ ĉiuj liaj verkoj estas subskribitaj per pseudonimo¨.

Heriberto Jara aldonas: ¨Sed la intensa aktivado de Guerra ne sukcesis kaŝiĝi sub unu aŭ alia pseudonimo, ĉe kampo kie la sbira spionado de la tirana Porfirio Díaz abundis pli ol vepro; tial, lian persekuton intensigis pli kaj pli, kaj finfine estis arestita kaj enkarcerigita… sed Guerra sukcesis skapi el la karcero, tamen lia familio kaj hejmo kruele estis ruinigitaj, tiel ke li devis elpatrujigi sin¨. Liaj du amikoj: Heriberto Jara kaj Camerino Z. Mendoza enŝipigis lin al Eŭropo.

Heriberto Jara sur la nova monero de 5 meksikaj pesoj

KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEF 2009

MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO invitas ĉiujn siajn anojn al asembleo, kiu okazos la 20an de junio 2009 je la 9a horo, en la posgradejo de la Jura Fakultato, kiu troviĝas en *Circuito Interior s/n, Ciudad Universitaria, Colonia Copilco Coyoacán, Delegación Coyoacán C.P. 04510*. La asembleo okazos laŭ la prezentata:

Tagordo:

1.- Malfermo kaj listo de anoj ĉeestantaj kaj aprobo de la tagordo.
2.- Estrara jara raporto.
3.- Interkonsento pri novaj proponoj por aliĝoj.
4.- Ĝeneralaj aferoj:
a).- Laborplano.
b).- Esploro pri la sidejo de la venonta kongreso.
c).- Informo pri la statutŝanĝo.

Meksikurbo, je la 31a de majo 2009

Mallely Martínez Mateos
Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL FME, 2009

LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, ASOCIACIÓN CIVIL, convoca a todos los asociados a la asamblea que se celebrará el día 20 de junio de 2009, a las 9:00 horas, en el edificio de posgrado de la Facultad de Derecho, ubicado en Circuito Interior s/n, Ciudad Universitaria, Colonia Copilco Coyoacán, Delegación Coyoacán C.P. 04510. La asamblea se sujetará a la siguiente:

Orden del dia:

1.- Inauguración, lista de presente de los asociados y aprobación de la orden del día.
2.- Reporte anual de la directiva.
3.- Acuerdo sobre nuevas propuestas de membresías.
4.- Asuntos generales:
a).- Plan de trabajo.
b).- Exploración de la sede del próximo congreso.
c).- Información sobre cambio del estatuto.

México, D.F., a 31 de mayo de 2009

Mallely Martínez Mateos
Presidenta de la Federación Mexicana de Esperanto, A.C.

10a MEKSIKA ESPERANTO KONGRESO EN LA JURA FAKULTATO DE LA UNAM

La 10a Nacia Kongreso de Esperanto en Meksiko, kies temo estas: "**Lingvistika diverseco en Meksiko: fundamenta parto de ĝia kulturo**", okazos baldaŭ, inter la 18ª kaj la 21ª de junio ĉi-jare, kies sidejo estos la Sekcio de Postdiplomitaj Studoj de la Jura Fakultato de la Universitato Nacia Autonoma de Meksiko (UNAM), kiu estas unu el la plej gravaj institucioj pri Supera Edukado kaj Postdiplomigo en Latinoameriko kaj kiu ankaŭ avangardas en la scienca esplorado pri ĝia fako.

Sendube tia evento estas la plej granda kaj grava en la lando, kie la esperantistoj havas la ŝancon praktiki parole la “Internacian Lingvon” kaj samtempe varbi Esperanton, eĉ pli se oni donas al ni la eblon realigi tiun eventon en rekona institicio kiel la UNAM.

Gravas mencii ke unu el la celoj realigi ĉi tiun kongreson en la "Plej grava Universitato de Meksiko" estas apogi la kursojn de la “Internacia Lingvo Esperanto", kiujn Magistro Luis Lorenzo Córdova Arellano, profesoro pri Internacia Juro en ĉi tiu universitato, komencigis antaŭ ses jaroj. Poste, la inĝenieroj kaj profesoroj Hugo González Monteverde kaj Daniel Moreno Martínez apogis aktive ĉi tiun projekton.

Kiel multaj el vi scias, la sukceso de nia kongreso dependas de la bona organizo kaj la investo de mono, tempo kaj konoj, krom de la partopreno de la kongresanoj. La kongresprogramo estas penplena de interesaj prelegoj kaj aktivecoj; inter ili la “Arta Vespero”, ekskurso al Tepotztlán Morelos kaj la “libroservo” Trovu pli da informo en http://www.esperanto-mexico.org/eo/kongreso

Helpu la Esperantan movadon en Meksiko, partoprenu la Kongreson!

10ª MEKSIKA ESPERANTO-KONGRESO

"Lingvistika diverseco en Meksiko – fundamenta parto de ĝia kulturo" 18a ĝis la 21a de junio 2009, Meksikurbo.

Intensa kurso / Seminario

13a ĝis la 17a de junio 2009

Ciudad Universitaria – Edificio de Posgrado de la Facultad de Derecho

Informoj: Federación Mexicana de Esperanto, A.C.
mek2009@gmail.com - http://www.esperanto-mexico.org

ALIĜILO

Persona Nomo:	Familia Nomo:
Kompleta adreso:	Lando:
Retadreso:	Naskiĝtago: Tago/Monato/Jaro
Profesio:	Telefono: Poŝttelefono:

( )Mi estas MEF-ano ( )Mi ne estas MEF-ano ( )Mi volas nun fariĝi membro de MEF

NUR POR MEMBROJ: **skribu la kvanton laŭ via elekto:**

( )Mi nun fariĝas MEF-membro por 2009 (200 MXN) _____
( )Mi aliĝas al la Kurso aŭ Seminario (300 MXN) _____
( )Mi aliĝas al la 10a Meksika Kongreso de Esperanto (300 MXN) _____
( )Mi aliĝas kaj al la Kurso aŭ Seminario kaj al la Kongreso (450 MXN) _____
( )Mi aparte donacas la sekvan kvanton. _____

Mi pagas entute: _____

POR NE MEMBROJ: **skribu la kvanton laŭ via elekto:**

( )Mi aliĝas al la Kurso aŭ Seminario (400 MXN) _____
( )Mi aliĝas al la 10a Meksika Kongreso de Esperanto (500 MXN) _____
( )Mi aliĝas kaj al la Kurso aŭ Seminario kaj al la Kongreso (700 MXN) _____
( )Mi aparte donacas la sekvan kvanton. _____

Mi pagas entute: _____

Dato/Subskribo:	Bv. pagi al: HSBC, Konto: 628 408 7436, nome;Morayma Martínez Mateos, MEF-kasistino, Clabe: 0211 8006 2840 8743 62 ///Se vi volas pagi per kreditkarto kontaktu nin rete! Gravas mencii ke la kotizoj ne inkluzivas loĝadon, manĝojn nek ekskurson.

Rimarkoj/Petoj:

PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEKSIKO

ESPERANTO ESTAS POR ĈIUJ!

Mallely Martínez Mateos*

Je la komenco de 2009 Sofía Carbot Rodríguez, membro de MEF, sukcesis ekinstrui Esperanton en la ĉefurbo de la lando al emeritaj personoj de la asocio nomata "Asociación de Jubilados y Pensionados del Poder Judicial Federal, A.C."**, kies prezidantino kaj kasistino estas la fratinoj Esther kaj María Hérnandez Avilés, respektive.

La 20 gelernantoj nuntempe uzas parton de sia libera tempo por lerni la "Internacian Lingvon", la reago kaj rezulto ĝis nun estas tre favoraj.

Inter la celoj de Carbot estas enkonduki la gelernantojn iom post iom al la fascina esperanta mondo sed ankaŭ ŝi klopodas prepari novajn Esperant-instruistojn. La agado de nia kara amikino Sofía kaj la bona partopreno de la emeritoj montras al ni ke Esperanto estas por ĉiuj, la aĝo neniel signifas limo, okupiĝi pri si mem, lerni novajn aferojn ĉiam donas al ĉiu pli da forto, sano kaj vivo.

Sofía Carbot kaj la emeritaj gelernantoj de Esperanto.

* Informonhelpe de Sofía Carbot.
** Estas asocio pri Emeritoj kaj Pensiuloj, kiuj laboris por la Federa Juĝistaro.

KOMENCIS LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN TIJUANA, BAJA CALIFORNIA

Mallely Martínez Mateos

En la urbo Tijuana, norde de la lando kiu havas limon kun la usona urbo San Diego, komenciĝis en majo Esperanta kurso en la kultura domo, la gvidantino estas Gilda Muñoz, kiu preskaŭ ekde sia esperantiĝo laboras forte disvastigante la "Internacian Lingvon". Nur kiel ekzemploj: ŝi kaj Martha Cárdenas partoprenis lastjare en la "Foiro de la Libro" per informstando; de tempo al tempo oni daŭre invitas ŝin informi pri Esperanto en "Radio Tecnológico 88.7" el Tijuana kaj plie ŝi partoprenos kiel preleganto en lingvaj kongresoj, kiujn organizis la Aŭtonoma Universitato de Baja California, per la temo "Esperanto, alternativo por la kultura kaj komunika diverseco"

Unu el la malfacilaĵoj, kiun trovis Muñoz estas ke la gelernantoj havas diversajn aĝojn, pro tio; la rapideco, la lernmaniero de ĉiu grupano estas malsama, tamen por ŝi tio estas defio; ŝi provas bone instrui ilin kaj atenti pri tiuj diferencoj. Menciindas ke la organizantoj de la 57a Landa Kongreso en Usono kunvokis diverslandajn esperantistojn partopreni skajpan paroladon dum la evento; bonŝance estis ke Gilda aliĝis kaj ŝi kune kun la komencantoj parolis kun eksterlandaj esperantistoj jam je la dua klaso. Gratulon pro tio! Ne kutime okazas ke novaj lernantoj havas tiel rapide rilaton kun esperantistoj de aliaj landoj.

Gilda Muñoz instruante Esperanton en Tijuana

Nun mi profitas la okazon danki al Gilda kaj la aliajn estraranojn de Meksika Esperanto Federacio ĉar la bona rezulto en Tijuana dependis, krom de ŝia instigo, de tiu proksima laboro inter ni. Certas do la jam konata proverbo: "Unuiĝo kondukas al venko".

ALIAJ ESPERANTAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO EKDE NOVEMBRO 2008

La sekvaj informoj estas nur eroj de la Esperanta agado en la lando, pli kompletajn kaj detalajn informojn ni publikos en la "Unua jara raporto de la MEF-estraro" dum la ĝenerala asembleo, kiu okazos dum la "10ª Meksika Esperanto Kongreso"

Informado

- Je la komenco de la jaro Meksika Esperanto Federacio partoprenis aktive dum la "Monda Socia Forumo, México 2009" per informstando. Estraranoj kaj aktivaj membroj de MEF kunportis gravan Esperantan materialon por montri al la homoj, ekzemple; flagojn, flugfoliojn, librojn, ludojn, ĉemizojn, algluilojn, revuojn, fotojn, ĵurnalajn atikolojn, instruilojn, ktp. Post du tagoj de intensa laboro ni ne nur montris tiujn aĵojn sed diskonigis ke Esperanto ekzistas kaj

Dancantoj dum la "Monda Socia Forumo, 2009, je la fono, la esperanta informstando.

plenumas sian taskon: “ĝi estas vera komunikilo inter homoj de proksimaj kaj foraj landoj” Ekzemplo de la efiko de tiaj partoprenoj estas la integriĝo de Lourdes Pérez al nia movado, ŝi la unuan fojon aŭdis pri Esperanto dum tiu evento kaj nuntempe partoprenas Esperantan kurson en la Jura Fakultato de UNAM, estas aktiva membro de MEF kaj daŭre apogas nin per sia ĉeesto dum lokaj renkontiĝoj en la ĉefurbo de Meksiko.

- Pluraj esperantistoj el diversaj partoj de la lando disdonis entute pli ol naŭ-mil flugfoliojn por informi pri la lernado kaj uzo de la Internacia Lingvo Esperanto. La menciita informilo estis rezulto de la helpo kaj kunlaboro de la Germana Esperanto-Asocio, kiu tre afable akceptis ke la MEF uzu la dezajnon kaj grandan parton de la enhavo por sciigi la homojn pri Esperanto. La tradukon de la germana al la hispana faris la prezidantino de MEF, Mallely Martínez Mateos. Dum la 10a Meksika Esperanto Kongreso okazonta en la Nacia Universitato Aŭtonoma de Meksiko (UNAM) ni disdonos pliajn kaj finiĝos kun la unuaj dekmil, kiujn ni produktis kaj tuj mendos alian kvanton. Ni dankas la disdonulojn pro helpi la estraron disvastigi Esperanton per tiu ĉi informilo kaj invitas aliajn kontribŭi kun nia laborteamo.

Martin Schäffer disdonante flugfoliojn kun informoj pri Esperanto.

- Senĉese la retpaĝo de MEF informas, kaj en Esperanto kaj en la hispana, pri diversaj kursoj, renkontiĝoj kaj aktivecoj en Meksiko kaj en aliaj mondpartoj. Ĝis nun unu el la efikaj agoj, kiujn ni uzas por kapti la interesulojn estas skribi rekte al tiuj novuloj, kiuj registriĝas en la retpaĝo ofertante helpon, per nia informado pluraj komencis ĉeestantajn kursojn aŭ per la reto kaj kontaktis esperantistojn

ĉirkaŭ sia loĝloko. Estas grava sentigi la aliajn ke ili ne estas solaj en Esperantujo kaj ke havas la subtenon de pli malnovaj movadanoj.

- Pro tio ni tre kore dankas al niaj lokaj kontaktoj de 20 urboj tra la tuta lando, kiuj respondis al homoj, kiuj kontaktis ilin demandante pri diversaj temoj rilataj al la esperanta movado. Unu el la plej gravaj rezultoj estas ke kelkaj homoj kontaktis al Denice Maldonado, nia loka kontakto en Monterrey kaj ili jam estas membroj de unu el la plej gravaj esperantaj grupoj en la lando.

Renkontiĝoj

- Dum la lasta duonjaro okazis diversaj lokaj esperantaj renkontiĝoj en pluraj lokoj de la lando, inter ili estas la kutimaj kunvenoj en gravaj urboj kiel Guadalajara, Monterrey, Oaxaca kaj en la ĉefurbo de la lando. Krome, de tempo al tempo, ankaŭ renkontas sin lokaj esperantistoj de aliaj urboj kiel tiuj de Chihuahua, San Luis Potosí kaj Tijuana.
- Gravas ankaŭ informi pri la sukceso de la du semajnfinajn renkontiĝojn okazintaj en februaro kaj aprilo en Guadalajara kaj Monterrey, respektive. La bonaj rezultoj de ambaŭ memorigas nin kiom grava estas sekvi kun la organizo de tiaj kunvenoj ĉar unuflanke la lokaj samideanoj remotiviĝas kaj plikonvinkas daŭrigi plibonigante la lokan esperantan movadon kaj, aliflanke, la interesuloj kaj novuloj povas vere rimarki la efikon kaj bonon de la lingvo tiel ke kelkaj iĝas esperantistoj.

Ludante dum renkontiĝo en Guadalajara.

Instruado

Ni tutcertas ke unu el la plej efikaj manieroj esperantigi la homojn estas per la instruado. Dum la lastaj monatoj okazis pluraj ĉeestantaj kursoj, bedaŭrinde la plej multo koncentriĝas en la ĉefurbo de la lando aŭ en la metropola zono, tamen la sukcesa rezulto ĝuigas nin.

- Krom la jam menciita kurso de Carbot, en la ĉefurbo de Meksiko okazis Esperantaj kursoj en la Jura kaj Ĥemia Fakultatoj de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM), gvidataj de la ĝenerala sekretario de MEF, Daniel Moreno. En la urbo Nezahualcóyotl, Milton Hernández daŭre havas grupon, kies anoj lernadas la verdan lingvon kaj en la Agrokultura Gimnaziejo de la Aŭtonoma Universitato de Chapingo okazis ankaŭ kurso por komencantoj gvidata de Mallely Martínez, prezidantino de MEF.

Mallely Martínez instruante Esperanton en la Universitato Aŭtonoma de Chapingo.

- Tamen ekster la ĉefurbo oni ankaŭ instruis Esperanton. Krom la nuna kurso de Gilda Muñoz en Tijuana, Luis Raudón, Katharine Brownshire kaj Luis Córdova laboris lasttempe intruante la lingvo en Acapulco, Guadalajara kaj Saltillo, respektive.

PRI AGADO DE EKSTERLANDAJ MEFANOJ

LA ATELIERO VERDA: ARTGALERIO KAJ INFORMEJO PRI ESPERANTO

Milan Sveda

La urbeto Drumheller (en Esperanto: Tambur-Inferulo) en la provinco de Alberto, kun loka loĝantaro de 6500 aspektas simile kiel aliaj okcidentkanadaj urbetoj. Ĝi tamen allogas pli ol duono de miliono da vizitantoj ĉiujare el multaj landoj, precipe pro la plej granda muzeo de paleontologio en la mondo, pro la unika pejzaĝo kaj pasiaj ludoj de Jesuo Kristo, kiuj en mondfameco rivalas al Oberammergau en Germanio.

En la ĉirkaŭaĵo de la urbo oni trovas dum pli ol jarcento kaj ĝis nun fosilitajn dinosaŭrajn ostojn de multaj specoj. Ĉe la turisma informcentro en la urbocentro troviĝas 46m granda replikaĵo de Reĝa Tiranosaŭro (lat.: Tyrannosaurus Rex) - plej granda en la mondo, kiu servas kiel observa turo.

En la ĉefa strato de tiu ĉi urbeto, meze de jam ekzistantaj kvar artgalerioj, la MEFanoj Milan kaj Jacqueline Sveda decidis aĉeti malnovan komercan konstruaĵon por servi kiel ekspozicejo de artaĵoj de Ĵaklin kaj informejo pri Esperanto. Membroj de KER (Kalgaria Esperanto-Rondo) unuanime akceptis rezolucion de okazigi ĉiujarajn piknikojn ĵus en ĉi tiu urbeto. Surprize, en la urbeto ekzistas grupo de Baha'i-anoj, kiuj esprimis intereson pri Esperanto kaj akceptis inviton al la pikniko. Oni ankaŭ provos inviti la Drumhelleran malgrandan, sed laŭdire aktivan grupon de Latin-Amerikanoj. La dato de ĉi jara KER pikniko estas dimanĉe la 2an de aŭgusto.

Fasado de la "Ateliero Verda"



La Baza Radikaro Oficiala estas listo de vortoj faritaj de la Akademio de Esperanto, en kiu oni kolektis ĉiujn oficialajn kaj fundamentajn radikojn kaj listigis ilin laŭ ofteca kriterio.
Por flue regi lingvon oni devas pensi rekte en tiu lingvo, oni evitu tradukojn. La rezultoj de rektaj metodoj estas ĝenerale superaj kompare kun metodoj, kiuj ofte uzas tradukojn.
En ĉi tiu libreto la lernantoj povas konsulti la plej gravajn vortojn de Esperanto, kaj lerni ilin per Esperanta difino aŭ helpe de bildo. Tiel oni kreas rapidan vojon inter la koncepto kaj la vorto en Esperanto, sen la devojo de la traduko. Ĉi tiu Ilustrita Oficiala Radikaro estas ege utila konsultilo, kiu devus esti en la poŝo de ĉiu lernanto de Esperanto. Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, faru vian mendon al la Meksika Esperanto Federacio. La prezo estas nur $70.00 (sepdek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.

La aboco de tempoplanado

- Tempo ne estas aĉetebla;
- Tempon oni povas nek ŝpari nek stoki;
- Tempon oni ne povas multobligi;
- Tempo foriĝas kontinue kaj por ĉiam senrevene.

Do, la tempo estas kapitalo donita al ĉiu persono samkvante. Individua tempokapitalo estas egala proksimume al 200,000 horoj de ankoraŭ planebla tempo.
La tuta libro estas aro da konsiloj por kaj kiel plej optimume uzi tiun tempan kapitalon por atingi sukcesojn kaj eviti stresojn kaj streĉojn.
Vi povas trovi tiun verkon en la libro servo de MEF. La prezo estas $60.00 (sesdek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.